

La Suda Kruco



Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

No 83 (Seventh Year)

Melburno (Melbourne), Australio.

10 majo 1927

LIBERAL DONATION FROM NEW ZEALAND ESPERANTISTS.

Our New Zealand friends took very kindly to the idea of having a Congress at Hobart last Easter. Although few had any intention of attending they all responded liberally to the Congress Fund. When information reached them that the Congress would not be held they unanimously agreed to devote the Fund to assist La Suda Kruco. S-ro W. H. King of Wellington, who did a great deal of propaganda work was asked to send the handsome sum of £8/9/- to us with a message expressing the hope that the assistance would relieve the publishing Committee of some of their worries. This it has certainly done. It has paid all expenses in connection with the production of one issue and gone quite a long way towards paying for a second. We here express our sincere thanks to our New Zealand supporters, assure them that their assistance is most timely and highly appreciated and in return assure them that every effort will be made on our part to keep the Suda Kruco such as to be looked for with interest each month. Once more we tender our sincere thanks.

SIXTH AUSTRALASIAN CONGRESS.

New Zealand Fund.

In response to a circular letter issued by me to New Zealand Esperantists inviting monetary assistance for the above-mentioned Congress, twenty-seven donations and Congress fees were received by me as follows:—W. McGuigan, 5/-; J. McGuigan, 5/-; Mangahao-Hydro Esperanto Class (per W. McGuigan), 11/-; J. Mader, 7/6; C. H. O'Dwyer, 7/6; Mrs. W. J. Butler, 5/-; J. Mackie, 1/-; Mrs. L. Payne, 10/-; J. Thom, 10/-; J. M. Vujcich, 5/-; M. Pavlinovich, 10/-; J. Majstrovich, 10/-; Mrs. T. Dorofalf, 2/6; W. H. King, 10/-; M. J. Ravelich, 10/-; Auckland Friends' Esperanto Class (per A. M. Jackson), 3/6; C. J. Nola, 2/6; P. Sunde, 5/-; M. Sunde, 5/-; M. Marinovich, 7/6; Miss E. Hodgkinson, 5/-; L. E. Dust, 2/6; Auckland Esperanto Society, 10/-; Miss D. Tilly, 2/6; D. Tilly, 2/6; S. M. Ujdur, 10/-; Dunedin Esperanto Class (per Miss M. McCarthy, 7/6; Mr. and Mrs. J. L. King, 5/-).
Total amount subscribed . £8 18 0
Less expenses 0 6 9

Balance for Congress . . . £8 12 0

Mr. J. G. Pyke, a well-known Melbourne Esperantist, left for Europe by the steamer "Ceramic," en route to the next Esperanto Congress, which this year will take place at Danzig.

After the postponement of the Congress had been definitely decided, I secured, by correspondence, the wishes of the subscribers, who instructed me to dispose of the moneys

in the following manner:—

Payment of subscriptions to La Suda Kruco:—W. and J. McGuigan. Mrs. W. J. Butler, J. Thom, J. M. Vujcich, M. Pavlinovich, J. Majstrovich, M. J. Ravelich, C. J. Nola (six months); P. Sunde, M. Sunde, Miss E. Hodgkinson, Auckland Esperanto Society (2 copies), D. Tilly, S. M. Ujdur, Dunedin Esperanto Class, Mr. and Mrs. J. L. King.

Donations to La Suda Kruco:—Mangahao-Hydro Esperanto Class, 11/-; J. Mader, 7/6; C. H. O'Dwyer, 7/6; J. Mackie, 1/-; Mrs. L. Payne, 10/-; J. Thom, 5/-; M. Pavlinovich, 5/-; W. H. King, 12/6; M. J. Ravelich, 5/-; Auckland Esperanto Class (per A. M. Jackson), 3/6; M. Marinovich, 7/6; D. Tilly, 5/-; S. M. Ujdur, 5/-; Dunedin Esperanto Class, 2/6.

Two refunds of 2/6 each were made, and postal charges on the last named correspondence amounted to 5/6. At this stage two subscribers increased their donations by 2/6 and 5/- respectively. The balance (£8/9/) has been remitted this day to the Editor of La Suda Kruco as subscriptions and donations to the gazette.

I desire to express my sincere thanks and great appreciation to all those friends who so generously responded to my appeal. Although the moneys were not used as originally intended, subscribers can rest assured that they have, by helping and supporting La Suda Kruco, done a laudable act and a service to the Esperanto movement in Australasia.

W. H. KING,

New Zealand Secretary for the Sixth Australasian Congress.

Wellington, N.Z., 21st April, 1927.

Turkey.

Esperanto also numbers adherents in all parts of Turkey. Groups are to be found in various localities and the Universal Esperanto Association has delegates in the principle towns. A Turkish Esperanto Association has recently been formed and officially recognised.

The most active group is that in Constantinople, under the presidency of the Turkish engineer, Hilmi Djelil Bey. Dr. Ali Fuad Bey, Inspector General of Hygiene in Constantinople, is also a fervent Esperantist.

—I.E.S.

KION ĈIU DEVAS SCHI PRI LA LINGVOSTUDADO.

Egar senton de supereco ĝuadas personoj, kiuj povas paroli krom sia gepatra alian lingvon modernan. Se ili scipovas, — imitinda estas ilia diligenco! Eĉ ne, se ili nur povas manipuli per kelkaj lingvaj ŝablonoj kiel per ludkartoj, tiam ne envidu. Multe pli preferu plenan posedon de la sola lingvo Esperanto, ol diletaj fuŝi per kelktrio da modernaj lingvoj! Sciuj bone, ke nacilingvoj subtenas ne nur la pensadon, sed ankaŭ la nepensadon per tio, ke ili metas grandan nombron de pretaj lingvoŝablonoj, naciismaj frazoj, fiksitaj esprimoj, je ĉies dispoŝo, kiujn li devas parkere lerni. Eĉ kompatinde senenhava cerbujo povas esti tapetita per tiaj luksaj frazeroj kaj tiel aspekti loĝata. — Tia estas bedaŭrinde tiu afero. Oni eble povus resti indifereanta al ĝi, se ĝi ne tuŝus, suferigintan propran infanaron. En la mezlernejoj oni devige lernigas fremdlingvojn. Tio nenecese suferigas la lernantojn; pro tio estas nepre neceso preparoli tiun aferon el vidpunkto de ĝia utileco kaj malutileco. — Depostjardekoj oni ripetadas, ke la lernantoj de la mezlernejoj tro estas ŝarĝataj per lernmaterialo, ke ili korpokaj spirite kadukiĝas sub la pezo de lernpostuloj kaj ke urĝe necesas radikala reformo de la mezlerneja instruplano. Ne estas dubo pri tio. Sed tamen ĝis nun preskaŭ nenio okazis por forigi tiun mizeron. Jen kelkaj vortoj pri tiu temo por informi speciale la gepatraron pri tio, kio precipe estas necesaj kaj ebla. — Ĉi scias, ke same kiel por muziko ankaŭ por studado de fremdaj lingvoj la koncerna talento estas necesaj. Sen tiu talento la lernanto ĉiam restas mallertulo. Spite al tiu tre klaraserto la mezlerneja instruplano tamen postulas, ke ĈIU mezlernejo lernu minimume du fremdajn lingvojn, neniam konsiderante, ĉu li havas por tio la necesan talenton. — Ĉu tiuj lingvoj havas tian edukan valoron kaj gravecon, kiel ekzemple matematiko aŭ la natursciencoj? — Ĉu ili por la venonta vivo de ĈIUG mezlernejoj estas egale necesaj? — Ĉu almenaŭ 10% de la mezlernejoj lernas dum 7—8 jara penado tiujn lingvojn tiom, ke ili povos bone interrilati buŝe kaj skribe kun la koncernaj nacioj? — Ne, ne, ne! La

eduka valoro de la lingvostudado estas tre malgranda, ĝi konsistas precipe nur el ekzercado de la memoro, el parkerado de lingvoŝablonoj kaj neregulaĵoj. — Por tio multe pli bone taŭgas aliaj regulecaj, logikaj instrumaterioj. — La angla verkisto Jack London diras (en sia fama romano "Martin Eden," ĉap. XIII.). "estas egale kion vi studas. Vi povas studi la francan, la germanan, aŭ jeti ĉion ĉi kaj profundigi en Esperanton. Vi atingos la saman kulturnivelon. Same vi povas okupigi pri la greka aŭ la latina, sed la lastaj **neniam utilos** al vi por io ajn." Simile juĝis Darwin, Davy, Farady, Mayer, Liebig, Helmholtz, Wilh. Ostwald kaj aliaj.

La devo de la lernejo estas, eduki la homon tiel, ke li sci **logike pensadi kaj memstare agadi**. La nuna lingvoinstruo efikas la kontraŭon. Ĉar malantaŭ ĉiu lingva regulo embuske staras la neregulaĵoj kaj esceptoj, pro tio la lernanto akiris la konvinkon, ke en niaj praktikaj aferoj logiko kaj reguleco ne estas necesaj, eĉ estas neeblaj. Li akiris tiel danĝeran malestimon kontraŭ ĉiu leĝo. — Por la praktika vivo la nun, instruataj fremdlingvoj nur malofte estas necesaj. La grekan oni nur tiom bezonas kiel la hebrean. El la latina la kuracistoj, juristoj, pastroj ktp. nur bezonas eretojn, kiujn ili povus bone lerni dum nur du aŭ unu jaro — kio ja ofte okazas, — ĉar nun ne plu estas necese legi latinajn aŭ grekajn verkojn en originalo, ĉar ili estas jam aŭ tute malmondermaj aŭ tradukitaj kaj la asertata fama eduka valoro estas trompo.

Kiom la plejmulto de mezlernejoj lernas la nacilingvojn, kiujn oni instruas, pri tio ĉiu povas konvinkiĝi, se li havos okazon aŭdi, kiel abiturintoj balbutas kun la koncernaj naciaĵoj. — Tamen proksimume 10 instruhoroj semajne estas dediĉataj al la por ĈIU deviga lingvoinstruado. Tio sumiĝas dum 7 ĝis 8 jaroj kun la prepara hejma laboro al 6000—7000 horoj! Tiuj terura multaj horoj estas por la plejmulto de la mezlernejoj tute malŝarita, **perdita tempo**, kvankam ili ofte, ho tre ofte kaŭzis multegan penadon kaj nervostreĉantan laboron. — Pro tio oni rajtas postuli reformon de la mezlerneja instruplano. Estas kompreneble, ke oni ne povos fari ĝin tiel, kiel oni ŝanĝas ĉemizon. — La mezlernejo lernigas la fremdnaciajn lingvojn, — kutime du, .. certe nur pro

tio, por ke la absolventoj povu interrilati kun la koncernaj nacioj. Sed kial nur kun du? Ĉie oni devas interrilati kun 4, 5 nacioj. Sed kiu povos lerni tiom da lingvoj? Granda embaraso! — Ne, neniam embaraso, ĉiu nur lernu la facilan internacian lingvon Esperanto kaj tuj li interkompreniĝos kun ĈIUJ nacioj, ĉar ĉie en eksterlando oni ekkomprenis la grandan utilon de internacia lingvo kaj komencis lerni kaj lernigi Esperanton. Kiu nacio plej bone progresos en tiu afero, tiu havos la plejan utilon per tio en la internacia trafiko. Do oni ne prokrastu, ĝis aliaj enposiĝos la profiton. Esperanton, tiun logikan lingvon lernos ĉiuj facile eĉ sen lingvotalento. Pro tio ĉiu devas postuli tujan instruadon de Esp. en ĉiuj lernejoj, sed unue en la mezlernejoj, kie tio povos okazi sen plia surŝarĝo de la lernantoj, simple per ioma limigado de instruo de la nun instruataj fremdlingvoj. Ĉar la eduka valoro aŭ utilo de ili estas preskaŭ nenia, pro tio **tute ne damaĝos**, se oni el la instrutempo de ili forprenos du horojn semajne kaj dediĉos ilin al Esp.-instruo. Tiel oni gajnos bonan preparon por la instruo de la **malfacilaj fremdlingvoj** naciaj. Tri-jara esp.-instruo sufiĉos. La lingvoinstruistoj saĝe ekkomprenu sian avantagon, tuj lernu Esperanton kaj post unu jaro ili jam povos ĝin instrui. — Poste oni **laŭvole** povos komenci per pli larĝa limigado en la instruo de fremdlingvoj. La tiel ŝparitan tempon oni uzos por la ĝis nun tro malatentata kaj tamen necesega korpo eduko, kaj por aliaj en la praktika vivo tre necesaj instruoj. El la memciitaj 7000 instruhoroj certe 1000 sufiĉos por esp., la aliaj restos por praktikaj scioj. — Oni memoru, ke **per fremdlingvoj ankoraŭ neniu inventis ion gravan por la homaro**. Oni pro tio ankaŭ malkonsilu **profesian** studadon de fremdlingvoj. — Post la reformo la abiturientoj certe ne scios balbuti fremdlingve, sed ili interkompreniĝos bone kun la tuta mondo kaj scios sufiĉon pri financaj, bankaj, ekonomiaj kaj aliaj por la vivo necesaj scioj kiujn lerni ili ĝis nun ne havis tempon.

La internacia paska konferenco en Praha (1927) ankaŭ pritraktos similan celon la peresperantan interlernejan korespondadon. En tiuj aferoj speciale la gepatraro, sed ankaŭ ĉiuj inteligentaj homoj devas helpi, ĉar ili progresigos tiel la propran infanaron.

Per la dirita reformo la mezlernejanaro kvazaŭ resaniĝos el la suferoj de la fremdlingva balasto, kiu nun kadukigas ĝian sana menson kaj kordon. Pro tio ĉiu helpu, por ke niaj posteuloj ne diru, ke ni en la komenco de la dua kvarono de la XX. jarcento estis same malsaĝaj, kiel la homoj antaŭ cent jaroj, kiuj kontrabatalis la fervojon.

ESPERANTO CLUB.

Welcome to a Russian.

A number of members of the Brisbane Esperanto Club met at the home of Mr. and Mrs. J. Carrick, Moorooka, for the purpose of welcoming Mr. W. J. Tulubieff, a young Russian Esperantist (a student of electrical engineering at the University of Queensland), whose presence in Brisbane has just been made known to the club, and whose departure to Clermont on practical surveying work is expected to take place at any moment. Those present included, in addition to the guest of honour, Mr. A. Staines (president) and Mrs. Staines, Mrs. N. Sunholm, Misses R. Riordan, E. Simpson, G. Carrick, and E. B. Carrick (hon. secretary), Messrs. Proctor and Baker.

Welcoming speeches were made by the president and Mr. Proctor, and a telegram in Esperanto was read from Mr. H. H. Hutton regretting his inability to be present, and asking that his greetings be conveyed to the guest.

Mr. Tulubieff suitably responded and in fluent Esperanto described his experiences since leaving Vladivostok, his native town. He painted a vivid picture of life in Peking, and his experiences there as a teacher of Esperanto.

A vote of thanks was accorded Mr. Tulubieff for his discourse.

Supper was followed by the singing of Esperanto songs, and a recitation of Dr. Zamenhof's poem, "La Vojo," was contributed by Mr. Tulubieff. The president conveyed thanks to Mr. and Mrs. J. Carrick for their kindness in giving the use of their home.

"Telegraph," 1/3/27.

Donations to Suda Kruco Fund. — Mrs. Tillotson, 5/-; Mr. Blyth, 1/-.

LETERO AL AMIKO EN EŬROPO.

Estimata samideano,

Ĉiuj esploristoj, kiam ili penis esplori la internon de tiu ĉi insula kontinento, fidis al la genio de la indiĝenoj. Al la vojaĝanto ili estis tiel utilaj, kiel kompasoj, kaj sciis kiel kaj kie havigi nutraĵojn. En la plej fruaj tagoj antaŭ ol oni sciis, ke la indiĝenoj havas lingvon dividitan en milon da dialektoj oni kondukis lin por agi kiel interpretisto.

El la historio de Aŭstralia esplorado la nomo de Jackey Jackey por ĉiam estos respektata. Li estis indiĝeno el Singleton, Nova Sud Kimrujo. Li akompanis la ekspedicion de Edmund Kennedy, kiam li iris por esplori la promontoron York Peninsula. La ekspedicio lasis Sydney-on je aprilo 29-1848. Kiam ĉiuj aliaj mortis aŭ ne plu povis daŭrigi la vojaĝon, Jackey Jackey akompanis Kennedy-on, kaj estis kun li, kiam li estis morte vundita per la lancoj de malamikaj indiĝenoj. Jackey portis Kennedy-on al la densaĵo. Lia priskribo de la lastaj horoj de la esploristo estas kortuŝa:—

—Sinjoro Kennedy, ĉu vi lasos min —, mi demandis.

—Jes Jackey, mi lasos vin—, diris la jam mortanta esploristo.

—Vi portu la librojn, Jackey, al la ŝipestro, sed ne la grandajn librojn. La registaro donos al vi multon por ili—.

—Mi kunligis la paperojn kaj tiam Kennedy diris—, 'Jackey, donu al mi paperon, kaj mi skribos,' kaj li malantaŭen falis kaj mortis.

—Mi kaptis lin dum li falis kaj tenis lin, tiam min deturnis kaj ploris.

Jackey sin regis kaj, per hakileto, faris krudan tombon por ricevi la korpon de sia estro. Li kovris ĝin per herbo kaj arbrunkoj kaj siaj propraj ĉemizoj kaj pantalone, kaj kiam noktiĝis li komencis la vojaĝon al la marbordo. Persekutata de nekompataj malamikoj, li vadis tra krokodilhavaj marĉoj kaj riveroj, ĝis la kolo! en la akvo, ĝis li atingis Albany-on, kaj trovis la ŝipon Ariel atendantan la revenon de la ekspedicio.

La registaro donacis al Jackey medalon, kaj li revenis al Singleton, kie li mortis de ftizo.

Simile herooj estis Yarri, iu indiĝeno el Gundagai. La blankrasaj in-

vaduloj de la lando de la nigrrasuloj mortpafis lian edzinon. Sed en 1844 kiam la rivero Murrumbidgee fariĝis enlanda maro, kaj la urbo Gundagai estis sub akvo, Yarri komprenis kia danĝero minacis la urbanojn, kaj en sia kanoto farita el peco de arborelo, li iris por savi ilin, li sukcesis savi 100 el la urbanoj. La grandecon de la tasko, kiun li prenis sur sin oni povas kompreni, kiam oni scias, ke post la subakviĝo nur 7 konstruaĵoj restis el 78, kaj 80 el 250 homoj pereis. Yarri mortis en la hospitalo de Cootamundra.

Neighbor estis malsimila tipo. Li estis indiĝeno el la rivero Roper distrikto, en la malproksima nordo de Aŭstralio, kie la indiĝenoj ne komprenis la leĝojn de la blankrasuloj, kaj kie la indiĝenoj opiniis ke ili havas la saman rajton mortigi bovon, kiel kanguruon. Neighbor estis arestita pro bovŝtelado. Li estis sur voje al la malliberejo, kondukata de policano Johns, kiu, kiel estis tiam kutime, enketenigis lin per pezaj ĉenoj, kaj devigis lin marŝi apud la flanko de lia ĉevalo. Ili estis vadante tra inundata rivero, kiam la ĉevalo renversigis kaj piedfrapis la kapon de la policano. Estis nur pro la rapida ago de Neighbor, ke la policano ne dronis. Neighbor tiris la senkonscian viron el la akvo, kuŝigis lin sur la riverbordon, kaj nur lasis lin kiam li estis komforte lokita. Malsanante la katenojn, per ŝlosilo,

kiun li prenis el la poŝo de la policano, li surseligis kaj forrajdis por trovi helpon. La vivo de la policano estis savita. Neighbor povus sin liberigi, sed li estis tro heroo.

Li iris en la malliberejon kun koro tiel gaia kiel infano. Li estis nur 16 jara . . . needukita sovaĝulo.

Lia heroeco tiel impresis la popolojn de la Norda Teritorio, ke ili atentigis la aŭtoritatulojn pri la heroo ago, kaj la Brita Reĝo donacis al Neighbor la Albert Medalon, la Viktoria Krucon por civitanoj.

Estis festa tago en Port Darwin, kiam ĉiuj el la urbanoj kunvenis por honori Neighbor'on . . . malaplomba junulo, sin demandante pro kio la ekscito, sed tamen viro, kiun la Reĝo plezure honoris. La medalo estis fiksita al lia jako de la gubernatoro. Estis la unua fojo, en kiu la Albert medalo estis donacita al nigrrasulo. Sed aliaj nigrrasuloj meritis ĝin.

Sinjoro Clement Wragg estinta ŝtata meteorologo, diradis, ke la Aŭstraliaj indiĝenoj pli multe scias pri astronomio ol la indiĝenoj el iu alia lando en la mondo.

Aŭstralia vojaĝisto en la nordo konstatis, ke li renkontis rimarkindan lingvistan indiĝenon, kiu povas paroli Bengalee, kaj la Singapore kaj la Manila indiĝenajn lingvojn, krom tio li flue parolas kelkajn Aŭstraliajn dialektojn.

Via fidele, P. H.

HAROLD PUDNEY

Specialisto pri Fontanplumoj

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per poŝto. Memoru la adreson

7 EQUITABLE PLACE MELBOURNE

THE READING OF ESPERANTO LITERATURE

is essential in order to obtain clear expression and good style.
WE HAVE AN EXTENSIVE STOCK OF THE LATEST LITERATURE
BY THE BEST AUTHORS.

Pro Iŝtar (Luyken), La Faraono (Kabe), Karmen (Merimee), Lilie (Synotte), The Complete Bible.

Send stamp for full price list. Include postage when ordering, 1d. for each 1/-.

MELBOURNE ESPERANTO SOCIETY, Box 731f, ELIZABETH ST. P.O.,
MELBOURNE.

DU LEGENDOJ EL LA AŬSTRALIA FOLKLORO.

(1) La Gruo Kaj La Korvo.

La gruo estis bonega fiŝisto. Per siaj piedoj ŝi ĉasadis fiŝojn el sub la arbotrunkoj subiĝintaj sub la riveretojn, tiel kaptante multe da ili. Unu tagon, havante grandan aron de kaptitoj surborde kuŝantan, ŝi ekvidis alveni korvon, kiu petis de li kelke da fiŝoj. "Ne; vi devas pacienci ĝis mi ilin bakos," diris responde la gruo. Sed la korvo estis forte malsata kaj sekve de tio senpacienca: ĝi do ne ĉesis ĝeni la gruan, kiu tamen ĉiam diris, "Atendu, atendu."

Post iom da tempo la gruo turnis la dorson al la korvo, kaj ĉi tiu kaŝe proksimiĝis al la fiŝoj por ŝteli el ili, sed la gruo, divenante, ke io malbona okazas, returnis sin, kaptis la ŝtelanton, ekprenis fiŝon kaj ĵetis ĝin al la korvo en la okulojn. La korvo pro tio blindiĝis por kelkaj momentoj kaj falis sur la cindrigitan, nigran herbon, ruliĝante torde pro doloro. Kiam li restariĝis, videble estis, ke nur la okuloj havas blankan koloron, kaj ke la resto de lia korpo estas nigra. De tiam ĉiuj korvoj tiel aspektas.

Nu, la korvo firme decidis venĝi al la gruan, pro tio, ke ĉi tiu kaŭzis al ĝi blankajn okulojn kaj nigran plumaron. La ŝanĝito do zorge observis por ekuzi oportunan okazon, kaj unu tagon, ekvidinte, ke la gruo profundo dormas, ĝi senbrue iris proksime al la malamiko, kun fiŝosto en la ungoj. Tiam, tre zorge, facilege, ne vekante la dormanton, ĝi enpuŝis la oston en la buŝon ĝis trans la langradikon de la gruo. Post tio la farinto forŝteliris tiel sensone, kiel ĝi alveris tre zorgante ne fari brueton.

Satdorminte, la gruo vekigis, kaj malferminte la buŝon por csendi ĝi forte sentis bezonegon sufoke kribi. Kian penon ĝi faris por forigi la obstrukcon el la gorgo! Baraktante kaj sin tordante, ĝi laŭte eligis strangan rauksonaĉon: tio estis ĉio, kion ĝi povis eligi, ĉar la ostoj firme tenis sin en la loko. Tial eĉ ĝis la nuna tago la ununura krio eligebla de gruo estas "ga-ra-ga-ga-ra-ga"!! kaj per tiu sono la Aŭstraliaj indiĝenoj nomas ĝin.

(2) Kiel la Suno Estiĝis.

Dum longa tempo neniam suno ekzistis,, sed nur luno kaj steloj. Tio es-

tis antaŭ ol la homoj alvenis sur la teron, kaj surtere vagadis nur la bestoj kaj birdoj, kiuj estis kelkoble pligrandaj ol estas la nunaj kreitaĵoj.

Unu tagon Dinewan, la dromajo, kaj Brajgah, la gruo, staris sur vasta plataĵo apud la rivero Murrumbidgee (elp. Murrumbiĝi). Ili malpaciis kaj interbatalis. Brajgah, tre kolerante, kuregis al la nesto de Dinewan, ekprenis el ĝi unu el la grandegaj ovoj tie kuŝantaj kaj ĝin tutforte suprenĵetis kontraŭ la ĉielon. Ĝi tie rompiĝis, frapinte amason da porbrula ligno. Tio ekbruliĝis, kiam la ovo-flavo verŝiĝis sur ĝin. Pro tio la malsupra mondo estis bele prilumata, je la miro de ĉiuj tie vivantaj, ĉar ili jam de longe al kutimiĝis al duonluma kaj sentis sin iom konfuzataj de tia brileco.

Iu bonfara spirito, kiu vivis en la ĉielo, konstatis kiel brile kaj bele aspektis la tero, prilumata de tiu konflagro. Li pensis do, ke bone estus fari bruligon ĉiutage, kaj tio jam fariĝas eĉ ĝis la nuna tago. Ĉiu tuta nokto li kaj liaj helpantoj amasigas brulotajn lignopecojn. Kiam la amaso estas preskaŭ sufiĉe granda ili elsendas matenan stelon por averti la teranojn, ke baldaŭ la ĉielanoj ekfaros la bruligon. Sed post kelka tempo ili trovis, ke tia averto ne estas kontentiga, ĉar la teraj dormantoj ja ĝin ne vidis. Ili pensis, ke la bruo estas necesa je la mateniĝo por anonci la baldaŭan alvenon de la suno kaj por vekti la dormantojn. Tamen ili ne povis decidiĝi pri elekto de vivaĵo taŭga por tia longedaŭra ofico.

Okaze ili ekaŭdis la ridan voĉon de Gaŭgaŭgaga, la kukaboro (Aŭstralia nomo de la birdo Dacelo gigas, ofte vulgare nomata Laughing Jackass; elp: laŝing ĝakas), tratanĉantan la aeron. "Jen la bruo, kion ni serĉas," ili diris. La kukaboron ili do informis ordone, ke jam de nun tiu kiam la frumaterna stelo ekpaliĝos, kaj la tago estiĝos, ĝi ridu je sia plejforta povo, por ke la ridado veku ĉiun dormanton antaŭ sunleviĝo. Ili aldonis ke se ĝi ne konsentos, ili ne konsentos ekbruligi plu la sunfajron; anstataŭe ili lasos la teron ree enfali en ĉiaman duonlumon, laŭ ties antaŭa stato. La kukaboro submetis sin al la volo de la spiritoj, konsentis plejforte ridi je ĉiu taglumiĝo, kaj tiel konservis la lumon por la terloĝantoj. Tiun agon

ĝi faras akurate depost tiu tago, plenigante la aeron per sia laŭta, elĝonga "gaŭ-gaŭr-ga-ga"!!

Kiam la spiritoj ekbruligas la fajron, ĝi donas nur malfortan varmon. Sed en la tagmezo, kiam la tuta amaso da lingno jam flamegas, oni forte sentas la varmecon. De tiu tagtempo ĝi iom post iom formortas ĝis nur la ruĝa, ardanta cindre postrestas je sunsubiro. Tio tre rapide estingiĝas, krom unu-du pecoj, kiujn la spiritoj kovras per nuboj kaj ŝpare metas flankon por ekbruligi la novan amason da lingno, kiun ili devas preĝigi por la venonta tago.

Oni ne permesas infanojn imiti la ridon de Gaŭgaŭgaga, la kukaboro, timante, ke la birdo aŭdos ilin, kaj kolerece ĉesos sian frumatenan krion. Se infanoj ja malgraŭ avertito ĝin imitas, nebezona dento elkreskas el supre de "subokula dento" (Angla: eyetooth). Tio devigas la malobeulon ĉiam porti porpunan signon, kiu montras lian malrespektajn, ĉar la bonaj spiritoj tre scias, ke se la tempo venos, kiam la Gaŭgaŭgagaoj ĉesos antaŭanonci la sunon per ride, tiam oni nepre ne plu vidos "Daens" (indigenojn) en la lando, kaj la duonlumo jam ree gajnos sian regardon.

—El la Angla tradukita de ROBO, Melbourne.

RECENZO.

LA ALTA KANTO DE LA AMO: laŭ malnova legendo rekantita originale en Esperanto de Teo Jung. Eldonita de "Heroldo de Esperanto." Horrem bei Koln (Germanujo); 33 paĝoj.

En plaĉaj simplaj versoj sinjoro Jung rakontas malnovan legendon pri la krucmilitoj. La edzo, kiu batalas en Palestino por liberigi la tombon de Kristo, la fidela edzino, kiu lin atendas kaj serĉas, iliaj aventuroj kaj fina ĝoja rekuniĝo—jen la temo.

La stilo estas fundamente kaj klara. La preso kaj kovrilo estas pli bonaj, ol oni kutime trovas ĉe libroj de tia amplekso. La verko estis premiita per la Natura Floro ĉe la Dekduaj Internaciaj Floraj Ludoj, kaj certe donos plezuron al multaj, kiuj ordinare ne amas la poezion. (A.D.)

SERVOKAPABLA! : MARCUS TYBOUT. Georges Eekhoud. El la flandra (franclingva) originale tradukis kun permeso de la aŭtoro Leon Bergiers. Eldonis F. Hirt & Sohn, Leipzig. Internacia Mondlitera-

turo volumo 20.

Mi legis en la antaŭparolo, ke Georges Eekhoud "estas certe la plej originala kaj propra belga verkisto, ... Li estas ne nur la ĉefo de la nuna belga literaturo Li estas figuro kiel hieraŭ estis Anaatole France . . . kiel estas hodiaŭ Romain Rolland." Sed la legado de la verko ne donis al mi la ĝuon, kiun mi esperis. "Servokapabla" estas insultegado kontraŭ deviga militservo, skribita de la vidpunkto de malamio de la sistemo. Estas ankaŭ dirita en la antaŭparolo, ke Eekhoud "estas la poeto de la stratulaĉoj," sed tio ne rajtigas lin skribi, kiel li skribis pri la gepatroj Goor, en "Servokapabla," kaj pri la diboĉoj de Marcus Tybout, en la alia historio. Ĉu ni devas laŭ tiu ĉi verko formi nian koncepton de la Flandra literaturo?

La tradukinto, Leon Bergieres — nur dudekjarulo—meritas malavaran gratulon. Li tre plaĉe uzas nian lingvon, kaj mi esperas iam legi alian tradukan de li verkitan el pli nobla temo. (C.W.C.)

LA KARTO MISTERA, alfaraĵo kaj tradukaĵo de la rakonto verkita de Cleveland Moffett, Edward S. Payson. British Esperanto Association, 142 High Holborn, London. Prezo, unu ŝilingo, plus afranko, aŭ 4 U.E.A. respondkuponoj po 30c. afrankite.

KRONIKO.

SYDNEY, N.S.K. — Moderna vivo postulas modernaj metodoj. Progreso demandas, ke ni ŝanĝu niajn kutimojn laŭtempe, sen kiu, antaŭenigo ne povas esti. Kiel vera tiuj vortoj estas inter esperantistaj rondoj! Ni facile parolas pri alilanda progreso de nia lingvo, pri radio, aviado, konstruado, reklamado, kaj mil aliaj aferoj, sed kutime forgesas alĝustigi nin inter nia propra kreskanta familiaro.

En Sydney oni tion rimarkigis, kiel en aliaj urboj, kaj pensis longe pri rimedo. Semajno post semajno membroj kunvenis, instruado okazis, lekcioj estis faritaj, kaj diversmaniere ni penis interesigi anojn per iom peza, pedagogia metodo. Sed la spirito mankis; nur la entuziasmo por nia afero kunligis nin kaj post disigo Esperanto ofte estis forgesita ĝis la proksima renkontiĝo. Kiel kaŭzi metamorfozon?

Nuntempa kliniĝo de la mondo es-

tas ĉefe al rapidigo kaj amuzaĵo. Ĉu oni ŝatas ĝin aŭ ne estas indiferentaĵo. Sed, se oni povas profiti per tia adapto, estus malsaĝe ne alpreni ĝin. Negocisto devas, alie li pereas. Kial ne esperantistoj?

Bone konsciante, ke de la junularo grandparte dependas nia estonto, la Sidnejanoj decidis zorgi pri ili kaj per alloga programero altiri ilin. Antaŭ ses monatoj estis decidita aranĝi regulan dancadon en la klubejo je la lasta ĵaudo de ĉiu monato. Sukceso estis tuja! Novaj vizaĝoj aperas, harmonio ekzistas, membroj sin pli rapide ekkonas, kaj eĉ maljunaĝuloj ne forestas tiujn vesperojn.

Ne nur per dancado oni plezurigas la membrojn kaj iliajn amikojn, sed inter ĉiu ero estas enmetita kanto, humoraĵo aŭ deklamo (angle kaj esperante. Per facila maniero oni atingis tion, kion oni ofte ne povas ĉe sekaj kunvenoj — propagandas kaj samtempe montras, ke esperantistoj estas tiel gajaj, kiel aliuuloj.

La Sydney-a klubo feliĉas disponi je bonaj muzikantoj — pianist(in)oj, bangoistoj, kaj haŭajaj instrumentistoj, kiuj ĉe diversaj vesperoj sin alternigas. Manĝaĵoj kaj trinkaĵoj ankaŭ estas provizataj. Ĉu oni povas miri, ke fino je la dek-unua estas ankoraŭ tro frua?

Kaj la financa flanko estas la plej ĝojiga fakto de ĉio. Ĉiu eniranto donas laŭvolan donacon ĉe la pordo kaj ĉar elspezoj neniam estas, ofte enkasigas kvar ĝis ses semajna luo-prezo.

Estus sendankema, se la nomoj de la ĉeforganizantoj de tiuj bonegaj vesperoj ne estu menciataj: F-ino M. Harwood, vic-prezidantino; F-ino Violet Fairfield, kasistino; kaj S-ro Victor Rutland. Ke ili daŭrigu la revivigon de tiu societo!

RAILWAYMEN AND ESPERANTO.

The official organ of the Swiss railwaymen at Bern has just introduced a permanent Esperanto column in the three editions of its organ "Der Eisenbahner" (German), "Le Cheminot" (French) and "Il ferroviere" (Italian). It is to be hoped that other technical organs will follow this example, which is of great importance for all railwaymen, and particularly for the external staff.

—I.E.S.

BRISBANE ESPERANTO CLUB. Kunvenas la trian Mardon ĉiumonate, 7.45 p.m., ĉe State Service Union Room, trian etaĝon, King House, Queen Str. Vic-Prezidanto, C. Kidd. Sekretariino, Miss E. B. Carrick, Office of Supt. Telegraphs, G.P.O., Brisbane.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro C. W. Ballard; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejoj: Public Benefit Bootery Building, 5th Floor, 323-325 Bourke St., Melbourne. Vendrede vespere, je la oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.45—10 p.m. ĉe "Rawson Chambers," Rawson Place (5a etaĝo, ĉambroj 580-583). Guste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro F. T. Simon, Sekretario: S-ro L. E. Pfahl, 150 George's River Road, Croydon Park, Sydney.

Hobart Esperanta Grupo. Kunvenejoj: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str.; ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A. Beckett, 177 Davey-str., Hobart.

Persista Grupo, Melbourne. Prezidanto: S-ro H. Byatt. Sekretariino: F-ino I. Thomas. Kunvenejoj kaj poŝta adreso, 37 Brunel St., East Malvern, merkrede vespere, je la oka horo.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.